# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E.

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés.Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E.: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

==== N° 154 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1987 ====

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Notre association invite chaque année à une rencontre fraternelle ses adhérents convaincus. Le but est de se connaître les uns les autres, de réchauffer les énergies, d' élever les esprits dans une réflexion commune. La dimension restreinte de notre bulletin ne nous permet pas de donner à nos amis absents de ce rendez-vous autre chose que quelques impressions et des compte-rendus succincts: rien ne peut remplacer la présence personnelle et le bénéfice qui rejaillit sur l' activité des mois suivants.

Notre projet pour 1988, c' est un pèlerinage à Lourdes; notre mouvement s' est placé, dès l' origine, sous le patronage céleste de Marie, et veut, une fois de plus, mettre son action, avec son aide tutélaire, au service de Dieu et de l' Eglise, sur les traces de nos précurseurs, Emile Peltier et les fondateurs du mouvement espérantiste catholique, profondément attachés à la dévotion mariale en ce lieu. Mais il ne suffit pas de regarder le passé: notre pèlerinage devra résolument orienter ses intentions et sa prière vers l' avenir.

Aussi, nous lançons un appel tout particulier à tous nos amis pour qu' ils fassent l' effort d' une participation effective; notre plus grand désir serait de faire de ce pèlerinage l' occasion d' une rencontre internationale. Il donnerait ainsi, dans ce lieu de prière universelle, le témoignage de l' action espérantiste parmi les chrétiens: cet esprit d' unité profonde dans la charité, au-delà de toutes frontières, dans la diversité des personnes, rapprochés les uns des autres par l' usage de leur langue commune.

Pèlerinage de l' avenir, mais que peut-on espérer sans la jeunesse? Nous répétons la question que nous posions lors de notre rencontre de Bagneux: comment pénétrer dans les milieux de jeunes chrétiens? Comment inspirer à ceux-ci le désir d' élargir leurs relations, de personne à personne, de groupe à groupe, sur la base des mêmes goûts, d' activités semblables, d' idées communes, de rencontres agréables, de découvertes culturelles?

../...

L' Esperanto progresse dans un univers où la spirituel a peu de place; à nous d' apporter cet élément indispensable à toute culture humaniste. Il faut progresser en nombre, mais aussi en qualité. Ceux qui en ont la capacité doivent se mobiliser pour former de nouveaux adeptes, pour les aider à devenir à leur tour des espérantistes à l' aise dans l' usage de la langue, passionnés des relations avec le monde, et porteurs de l' esprit et de la vie évangéliques.

Tel sera l' objet de notre prière et de nos réflexions dans les lieux privilégiés où Notre-Dame nous convie.

R. Cl. COLAS

RESUMO

Ni planas, en la jaro 1988, ĝeneralan kunvenon de nia asocio dum pilgrimado en la sanktejo de Maria, Nia Sinjorino, en Lourdes. Ekde la fondado de Espero Katolika kaj de I.K.U.E., Pastro Emile Peltier kaj liaj kunlaborantoj alvokis la protektadon de la Sankta Virĝino por siaj celoj, en la benata urbo pirenea. En tiu venonta pilgrimo, ni volas konsekri la estonton de nia movado al la Dipatrino kaj peti ŝian helpon por niaj malfortaj klopodoj.

Nia granda deziro estas fari el tia okazaĵo internacian renkonton por, en komuna preĝo, atesti la veran signifon de nia agado, celante alporti, super la materian progreson de Esperanto, la spiritan trezoron de la evangelia amo, cemento de la homa frateco.

Tiucele, ni devas enkonduki nian esperantan idealon en niajn rondojn, kaj gvidi novajn amikojn sur la vojo al praktiko kaj kapableco en la uzado de la lingvo.

Ĉefe la fundamento de la estontaj tempoj estas ĉe la junularo; movado ne povas daŭri se ĝi ne estas forta je junaj adeptoj, pretaj al daŭrigado kaj ampleksigo de la laboro jam de unu jarcento komencita.

R. C. C.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

LETERO AL DIO PRI DIO

Tio estas letero pri Vi, mia Dio, sed ankaŭ letero por Vi, por la aliaj, por mi. Tio estas letero por diri al Vi ion tute simplan: mi amas Vin.

Mi amas Vin, kial? Ĉar, ĉar... mi ne tro scias, eble ĉar mi ŝatas la mondon, la vastegan mondon, belan, belan, kiel via amo...

Mi ne scias, kiu Vi estas, Sinjoro, eble tutsimple spiro, fortega spiro, kiu, frakasante ĉiujn obstaklojn, enfiltriĝas ĉien, ĝis la homa koro. Vi estas tie, meze de niaj vivoj, kaj malgraŭ tio, mi foje serĉas Vin en malluma nokto; mi gvatas la lumon ne trovante ĝin; mi ne vidas per miaj homaj okuloj kaj ofte la rigardo de mia koro estas blindigita pro mia fidomanko.

Mi ne multe konas Vin, Sinjoro; mi scias nenion pri Vi aŭ pli precize mi scias nur tion, kio estas grandioza: Vi amas min... senpage, antaŭ mia naskiĝo, antaŭ mia koncipado; mi estas vivanta per via amo...

Vi ja estas ĉio kaj nenio, Sinjoro. Vi estas ĉeesto, Vi estas "mi estas" laŭ Moseo... Kial do ne ami Vin? Mi ŝatus ami Vin, mia Dio, kiel knabo amas sian patron, tutfide, serene, admire!

K. M.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

11-a INTERNACIA ESPERANTO PILGRIMADO AL BANNEUX (Belgujo)

(Sabaton 12-an/lundon 14-an de septembro 1987)

Sabaton kaj lundon: individuaj preĝoj (Rozario, Meso, Krucvojo, ktp)

Dimanĉon 13-an: internacia renkonto. Ni kune kaj oficiale dankas la Sanktan Virginon por la 100-jara jubileo de Esperanto.

9.00 : akcepto kaj interkono en Pavilono Shabann, malantaŭ esplanado.
9.30 : mallonga prelego kaj interŝanĝo pri la temo de la renkonto: "Rolo de la S-ta Spirito en kaj per nia Esperanto-movado" diversaj demandoj.
11.45: tagmanĝo
14.00: kuncelebrado de Eŭkaristio
15.00: esperantlingva partopreno en la publikaj preĝoj por malsanuloj.

N.B. por noktoj kaj manĝoj, senpere averti la hotelon ITALIA 26, rue de l' Esplanade 4960 BANNEUX-LOUVEIGNE Tel. 19 32 41 60 89 15.

## PRI NORVEGUJO

Estas sufiĉe da arboj en Norvegujo, ĉar pli ol 1/5 de la lando estas arbarkovrita, ĉefe en la centraj regionoj de suda Norvegujo. La forstado havas vastan meĥanikigon kaj motoriĝon. La motorsegiloj anstataŭis la mansegilojn, sed la flosigado de trunkoj laŭ la riveroj ankoraŭ estas kolorriĉa trajto de la norvega vivo.

Frapas la eksterlandanon la fakto, ke la ege plej granda parto de la familidomoj kaj aliaj etaj loĝdomoj estas el ligno, eĉ en la ĉefurbo. La norvegaj arbaroj abundas je fruktoj, ĉefe mirteloj kaj vakcinioj, maturaj en frua aŭtuno. Ankaŭ la faŭno abundas: alko, kapreolo, leporo, sciuro. La vario de arbaraj birdoj ne estas malpli riĉa. La arbaroj provizas la lignopast- kaj paper-industrion per kiu la lando distingiĝas en la internacia komerco kaj eksportas paperon, kartonon kaj meĥanikan kaj ĥemian lignopaston en la tutan mondon.

Grava trajto de la moderna Norvegujo estas la konservado de la kulturaj trezoroj de antaŭaj tempoj, ĉefe la lignaj fostokirkoj. Ili estas bone konservataj, kiel vivanta memoraĵo de la frua kristana periodo. La plimulto datiĝas de la XII-a kaj XIII-a jarcentoj. Ili estas ekskluzive el ligno kun subportantaj fostoj aŭ "stavoj"", kaj ornamitaj per belaj ligno-skulptaĵoj ofte prezententaj fantaziajn bestojn kaj plantojn. La modernaj kirkoj ankaŭ impresas, ĉefe tiu en Tromsø, konata kiel katedralo de Arkta Oceano kaj konsekrita en 1965. Pli ol 95 % el la enloĝantoj estas luteranoj, membroj de la ŝtata Eklezio. Tamen la konstitucio garantias absolutan religian liberecon.

La disvastigo de la kulturo kuŝas en la popolbibliotekoj. Preskaŭ 1500 ekzistas, eĉ en la plej foraj distriktoj. Ili ankaŭ uzas ŝipojn por servi homojn sur izolitaj insuloj. Same la migraj ŝtata teatro, ŝtataj koncertoj kaj ŝtata artgalerio aranĝas prezentojn, koncertojn kaj ekspoziciojn en ĉiuj partoj de la lando. La norvega radio kaj televido (NRK) estas ŝtata institucio kaj havis ĝis 1981 la monopolon de la dissendoj.

Homoj ilustris la norvegan kulturon. Edvard Grieg estas la plej fama komponisto. Li naskiĝis en Bergen en 1843 kaj vivis kun sia edzino kantistino ĉe Trollhaugen, tuj ekster la urbo. Li mortis en 1907. En siaj verkoj, li ofte uzis melodiojn el la norvega folkloro. Henrik Ibsen (1828-1906) estas majstro en la monda literaturo. La sociaj kaj psikologiaj dramoj, kiujn li verkis, ankoraŭ hodiaŭ estas ludataj en la tuta mondo, ekz. "Pupdomo, La sovaĝa anaso"...
La pentristo kaj grafikisto Edvard Munch (1863-1944) akiris fortan pozicion inter la grandaj nomoj en la arthistorio. Li akiris grade rekonon, kiel pioniro de ekspresionisma pentroarto. La plimulto de liaj verkoj staras en tre vizitata muzeo en Oslo.

(daŭrigota)

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## SUKCESOJ DE NIAJ MEMBROJ EN LA EKZAMENOJ DE F. E. I.

ATESTO PRI LERNADO: S-roj BESSIERE (TB), DEGOUL Dominique (B), PIERRU (B), VANGHELUWE.
ATESTO PRI KAPABLECO: S-ino MICHAU (B).
DIPLOMO PRI ALTAJ ESPERANTAJ STUDOJ: F-ino PREUX, S-ro DEGOUL François (B).

Sincerajn gratulojn al ili. Kiuj sukcesos en 1988?

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## NOVAJ MEMBROJ 1987

7) F-ino LACORD (Paris); 8) S-ro CACCIUTTOLO (Vaucluse)

Koran bonvenon kaj longan membrecon al ambaŭ!

* * *

IKUE-membroj: 36) S-ro VILLENEUVE; 37) S-ro COUSSON; 38) F-ino STUTZMANN; 39) S-ro LAVARENNE; 40) S-ro LEYDER; 41) S-ro SANSON; 42) S-ro PONS; 43) P-ro BOURDON; 44) S-ro DESPINEY; 45) S-ro LEBRUN; 46) S-ro THIOLLIERE.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## JUS APERIS

1. Eta sabat-dimanĉa breviero, de P-ro Eichkorn. Kun muziknotoj por la psalmoj kaj arioj por la himnoj. 60 paĝoj kun bildoj, perfekte presita.
   60 F + sendkostoj ĉe Libroservo B.P. 23 54510 TOMBLAINE.
2. Nouveau cours d' Esperanto, de Ludwig kaj Triolle. 200 p. 43 F.
   Libroservo Grésillon 49150 BAUGE.

## STRANGULOJ ĈU SANKTULOJ?

Ĉiu homo devas aspiri sanktecon, do ĉiu pli kaj pli devas perfektiĝi spirite. Ja ĉiu el ni posedas siam propran vivovojon por ĝin trapasi. Unu pli longan, alia malpli longan. Unu travivas 60 jarojn, dua nur 25, alia 80 kaj iuj eĉ pli ol 90 jarojn.

La vojo al sankteco ne estas larĝa aŭtovojo, sur kiu eblas veturi komforte, agrable kaj sekure. Ĝi estas la vojo, sur kiu ni trafas marĉojn, ni devas antaŭvidi ŝtormon, unuvorte - la vojo estas ege malfacila.

La vojo de l' vivo de ĉiu sanktulo estis alia, sed por ĉiu el ili ĝi estis nur penega suprengrimpado por atingi perfektecon. Por neniu el la sanktuloj venis tiu ĉi strebado facila. Atente esplorante la vivon de la apostoloj kaj unuaj kristanoj - martiroj, ilian vivon ni povus nomi "frenezaĵo".

Ekz. tia estis sankta Francisko el Asizo, kiu decidis fondi ordenon de malriĉeco dum en la sama tempo multaj riĉiĝis. Ankaŭ beata patro Maksimiliano Kolbe dediĉis propran vivon por savi familian patron en kondiĉoj, kiam aliaj deziregis liberiĝi el la tera infero - kio estis koncentrejo.

Ni scias ankaŭ pri sankta Vincento de Paŭlo (mortinta 1660) fervora sacerdoto, adepto de batalo kontraŭ maljustaĵo. Li povis ja en sia vivo avanci en la reĝa rango kaj tute ne interesiĝi pri bezonoj de malriĉuloj. Li estis palaca sacerdoto de la reĝino Margaret el la familio Gondi. Li havis kontaktojn kun senperaj regantoj de Francujo - kun reĝo Ludoviko XIII-a kaj regentino Anna el Aŭstrujo. Tamen siajn influojn inter regentuloj li ne profitis por si mem, sed por la bono de bezonuloj. Similaj homoj estis multaj.

ĈU ILI ESTAS STRANGULOJ, ĈU SANKTULOJ?

Ĝi estas demando de la nuntempa homo, kiu ne scipovas rezigni, ĉar li estas egoisto. Rezigni? Sindediĉi? Suferi por iu alia? Tio ĉi estas ĝenerale strangeco en la opinio de multegaj. Tamen ĉiu el ni, verdire, en la korprofundo deziregas noblajn agojn, kiuj meritas admiron kaj respekton. Eble ni ne tro ofte primeditas nian vivon kaj agadon? Tro ofte ni vivas sur la tero kvazaŭ la morto neniam atingos nin. Ja ĉi tie sur la tero ni devas peni pri la "pasporto" al la ĉielo. Ĉu sanktulo povas estiĝi NUR HOMO, KIU ESTAS MONAĤO? Ne, por ĉiuj eblas la sankteco: por laboristo, direktoro, ministo, metalurgiisto, terkulturisto, studento kaj ankaŭ sacerdoto kaj monaĥo.

"Popularaj malbonoj" estas por ni "bono" aŭ "normala afero". Milionoj da homoj en la mondo pekas kaj opinias, ke iliaj faroj ne estas pekoj, kaj kiam iu volas kontraŭi malbonaĵon, li estas ofte nomata - strangulo. Ni ne estu influataj de amasiĝanta malbono. Sanktuloj ne estas riĉuloj je la teraj riĉaĵoj, ili estas riĉuloj je la eternaj valoroj. Sanktuloj aliformigas la mondon ne per sia orgojlo kaj fifiero, sed per sia humileco kaj servo.

Sanktuloj pacigas la mondon ne per la milita forto, sed per sia nobla k koro. Sanktulo beligas la mondon ne per oro, sed ĝuste per siaj bonaj faroj kaj per sia sankteco.

Jan Scholtyssek Postfach 2321 D-5300 BONN 1 FRG

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LA STELLAGA INFANO (Alzaca legendo)

La lago "Perkoj" estis malbenita, hantita de la malbonaj ĉieluloj. Iun tagon aŭ pli bone iun nokton, infano estis kontemplanta la stelplenan ĉielon; kulbutita ĉe la fenestro, subite li vidis grandan stelon defali el la firmamenta volbo.

La orvosta kometo falis pli kaj pli proksimen por fine malaperi en la k kruta cirko de la malbenita lago, situanta meze de la montaro. Mirigita la infano volis retrovi sian perditan stelon. Sin forsavante el sia ĉambro, kurante tra la arbaro, transsaltante la rokojn, trairante la rivereton, li alvenis la lagon.

Ho! mirindaĵo! Ĝiaj malhelaj akvoj trembrilis je lumo; ĝia fundo aperis stelplena; unu stelo pli granda kaj pli bela altiris la infanon pli ol la aliaj. Li rekonis ĝin, deziris ĝin, volis ĝin tuj, ĉar ĝi estis ĝia falstelo; etendinte la brakojn al ĝi, li falis en la profundajn akvojn de la malbenita lago. Li ne plu reaperis. Oni aŭdis el la lago ĉielan muzikon, la libeloj dancis super la blua akvo de la lago. De tiam, la lago "Perkoj"ekzorcizita de la infano, kiu tiel admiris kaj amis la falstelon, ricevis la belan kromnomon "Stellago".

Sendis S-ino Scheidel.

## LEGENDO DE LA PASIFLORO

Ofte, la nomoj de plantoj devenas de la esploristoj aŭ ŝipistoj, kiuj kunportis nekonatajn kreskaĵojn. Multaj specioj havas la nomon de tiu, kiu malkovris ilin. Kelkaj ricevis nomon de bestoj aŭ objektoj al kiuj ili similas.

Misiisto, kiu venis la unuan fojon en Latinamerikon, vidis volvajn plantojn plenajn je belegaj floroj. Rigardante pli atente, li surprize rimarkis la kuriozan formon de la stamenoj, de la rostretoj kaj la aranĝon de la koloritaj petaloj; la tuto memorigis pri la iloj, kiuj servis por la krucumado de Kristo.

Estas kurioze trovi la najlojn kunigitaj, ĝenerale rustkoloraj aŭ sangkoloraj. La spongo trempita en la galon simboliĝas per la stamenoj ĝenerale dubebrunflavaj. La dornkrono diverse kolorita laŭ la speco, hele blua, blua aŭ viola, sed ĉiam tre preciza kaj formata per multaj delikataj petaloj.

Memore al tiu ĉi analogio kun la krucumadaj objektoj, oni nomis ĝin "pasifloro".

Legendo naskiĝis. Tiu kreskaĵo antaŭe estis granda arbo kun belega trunko. Bedaŭrinde oni elektis ĝin pro ĝia ligno, kiu taŭgis por la fabrikado de la Krista kruco pro sia fortikeco. Sed la kreskaĵo estis afliktita pro tia rolo. Jesuo komprenis kaj kompatis al ĝia ĉagreno. Por ke ĝia trunko aŭ ĝiaj branĉoj ne plu estu uzitaj por krucumi, li transformis la grandan arbon en gracian etan planton.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

### JE L' FINO DE AJNAJ VOJOJ

Je l' fino de ajnaj vojoj
Hejmnesto
Je l' fino de ajnaj tempestoj
Haveno
Je l' fino de ajnaj noktoj
Aŭroro

Je l' fino de ajnaj malamoj
La amo
Je l' fino de ajnaj malesperoj
La espero
Je l' fino de ajnaj mortoj
La vivo

Je l' fino de ajnaj forlasoj
Maria
Je l' fino de ajnaj malfortoj
Spirito
Je l' fino de ajnaj krutaĵoj
Jesuo
Je l' fino de ajnaj sopiroj
La Patro.

Tradukis Simone BONIOL

### FELIĈA TAGO

Se vi malkovris, ke estas sola,
ke malplena staras via fotel',
ke triste kuŝas kuseno mola,-
ne pensu pri tiu ĉi bagatelo.

Matene okazis renkonto ĝoja
kun najbaro sur la mallarĝa strat',
kredu, ke ĝi ne restos lastfoja,
ĉar li estas kora kiel la frat'.

Al vi ridetis eta infano,
iu donis lokon en aŭtobus',
hodiaŭ ne turmentis malsano
kaj de foro venis letero ĵus,

Ĵus nun, de ili disiĝas varmo,
mi legas priskribon de la vojaĝ',
ĉiu vorto fascinas per ĉarmo,
sur ĉiu linio - bona novaĵ'.

Konatulo per kiso salutis,
alia venis kun odora flor'.
Per feliĉo min tago surŝutis,
pereis la zorgoj kaj plor'.

A. APOLLO

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

### NIAJ ĜOJOJ...

Nia fidela anino S-ino Cheverry el Angers ĉeestis en la printempo la baptofeston de sia pranepino. Gratulon kaj longan vivon al la nova kristanineto.

### ... KAJ MALĜOJOJ

En julio, pro trafikakcidento, pereis unu fratino de nia amiko François Lo Jacomo.

R. Triolle, prezidantino de U.F.E., funebras pro la forpaso de sia patrino.

Al ambaŭ familioj ni prezentas sinceran kondolencesprimon.

N.B. Ne forgesu informi pri viaj familiaj eventoj: naskiĝoj, edziĝoj k. a.

## PILGRIMADO EN LOURDES

Ĝi okazos de ĵaŭdo 7-a ĝis lundo 11-a de aprilo 1988 en "Domo de l' Assomption", kiel en 1983.

Pliaj informoj kaj programo aperos en la decembra numero de F.K.E.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO

p. 1.2. Bileto de la prezidanto
2. Letero al Dio pri Dio
11-a internacia Esperanto-pilgrimado al Banneux
3. Pri Norvegujo
Diversaj informoj
4. Stranguloj ĉu sanktuloj?
La stellaga infano
5. Legendo de la pasifloro
Poezia angulo
Familiaj novaĵoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## KOTIZTABELO 1987

| | |
|---|---|
| IKUE kun "Espero Katolika" | 90 F |

Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

----------

| | |
|---|---|
| ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo) | 30 F |
| Geedza paro | 40 F |
| Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 15 F |
| Bonfaranto | 150 F |
| Dumviva membro | 600 F |

----------

| | |
|---|---|
| UFE kun "Revue Française" | 195 F |
| UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 200 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 3ème trimestre 1987 !! Polycopié par l' A. C. F. E.

C.P.P.A.P. n° 62 532. !! Prieuré St-Martin

Directeur: René-Claude Colas !! La Houssaye-en-Brie

Directeur-délégué: !! 77610 FONTENAY TRESIGNY

René-Jean Marmou !! FRANCE

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx